

ESPERANTO

★ TRIUMFONTA ★

N-o 39, 3. Julio 1921.

Jurnalo internacia, universala, sendependa
eldonata de Teo Jung, K6th-Horrem (Germ.)

* Eliras semajne. *

Urbo Offenbach garantias 7000 mk. por instruado de Esperanto. 163 delegitoj el 13 nacioj partoprenis la III-an Tutruslandan Esperanto-Kongreson en Petrograd (1.-5. junio).

Bona ekzemplo de urbo Offenbach.

Urba parlamento de Offenbach enkondukas Esperanton en urbaj lernejoj.

Funkcias 12 kursoj kun 350 lernantoj.

Salajro por instruistoj de Esperanto.

Lastan aŭtunon la Offenbach'a Esp. Grupo aranĝis paroladon propagandan por geinstruistoj. En la bone vizitita aranĝado parolis la subskribinto, kiu ankaŭ gvidis la kursojn por 20 sin anoncintaj geinstruistoj. Post finiĝo de tiu kurso fondiĝis Esp. Grupo de Offenbach'aj Geinstruistoj (prez. s-o prof. d-ro Büttner, Offenbach, Blumenstr. 15).

Dank' al la lerta laboro de ĉiuj amikoj de nia afero, la Offenbach'a urba parlamento sin okupis pri la esp. movado. Ĝi decidis enkonduki en la urbajn lernejojn esp. instruadon laŭvolar. La instruistoj gvidantaj lernejarajn kursojn ricevas salajron, al la lernantoj la urbo liveras senkoske la lernolibrojn. 7000 markojn oni pretigis por ĉi tiu celo. 12 kursoj komenciĝis kun preskaŭ 350 lernantoj.

M. Urban, Frankfurt a. M.

La tria Tutruslanda Kongreso Esperantista

okazinta en Petrograd de la 1-a ĝis la 5-a de junio, estigis viglajn diskutojn inter la reprezentantojn de la Esperanta Sekcio de Komunisto Internacionale (ESKI) kaj de la Tutruslanda Esp. Federacio (TEF). La kongreso akceptis jenan rezolucion laŭ propono de ESKI:

„Atentante la nunan precipitan disvastiĝon de Esperanto en proletariaj kaj laboremaj rondoj kaj la esencan utilon, kiun internacia lingvo devas kaj povas alporti por la unuigo de la laboremaj klasoj de l' homaro kaj por la triumfo de la principoj de Sovjeta Regosistemo, — III-a Tutruslanda Kongreso Esperantista opinias, ke fundamenta tasko de la rusa esperanta movado estas laŭpova subtenado al la Sovjeta Registaro por la lingvo Esperanto kaj helpo al ĝi en aferoj de efektivigo de ĝiaj internaciaj taskoj. — Kiel plej bonan formon de la

esperanta movado Kongreso konfesas la organizon de esp. filioj kaj rondetoj ĉe ĉiuj proletariaj, profesiaj kaj klerigaj organizaĵoj de la Respubliko.“

Tre interesa estas la statistiko pri la nacieco, particeco, profesieco kaj klereco de la partoprenintoj. La kongreson partoprenis delegitoj el 75 diversaj urboj de sovjetaj landoj: Petrograd, Moskvo, Kiev, Tiflis, Ĉita (Malproksima Orienta Respubliko), Irkutsk, Omsk, Tomsk kaj Barnaul (Siberio), Herson, Tambov, Krasnodar, Orenburg, Astrahani, Arhangelsk k. a., sume 163 delegitoj.

Laŭ nacieco estis 114 rusoj, 15 hebreoj, 7 latvoj, 6 germanoj, 5 ukrainoj, 4 estonoj, 4 poloj, 2 litovoj, po 1 hungaro, anglo, finno, svedo kaj ĉuvaŝo; 3 ne montris naciecon.

Laŭ particeco estis 34 komunistoj, 10 socialistoj, 2 anarhistoj, 110 senpartiaj; 6 ne montris particecon.

Laŭ profesieco estis 33 oficistoj, 23 instruistoj, 17 studentoj, 13 lernantoj, 15 poŝtelegrafistoj, 9 fervojistoj, 9 manlaboristoj, 6 inĝenieroj, 6 teknikistoj, 5 presistoj, 5 literaturistoj, 3 militistoj, po 2 profesoroj, kuracistoj, tradukistoj, aktoroj, kaj juristoj; 7 havis alian profesion; 3 ne montris profesion.

Laŭ klereco 105 havis duagradan klerecon, 25 unuagradan, 15 superan, 11 specialan; 9 ne montris klerecon.

La III-a Tutruslanda Kongreso pruvis, ke Esperanto en la vasta lando de la sovjetoj faras bonajn progresojn, ke la movado en Ruslando estas eĉ pli vigla kaj pli intensa ol iam antaŭe, malgraŭ ĉiuj specaj malhelpaĵoj. Aliflanke la fakto, ke estis eble al la delegitoj entrepreni tiajn vojaĝojn (kelkaj venis de tre malproksime kaj veturis 3000—5000 kilometrojn por viziti la kongreson) evidencigas, ke la ĝenerala situacio en Ruslando en lasta tempo multe pliboniĝis. Kaj ni rajtas eĉ esperi, ke ankaŭ dum nia internacia kongreso en Praha ni povos saluti kelkajn el niaj rusaj samideanoj.

:-: Ne plu hezitu! :-:
**Tuj vin anoncu por Praha
ĉe la ĝen. sekr. Aŭg. Pitlik,
Praha III, Nerudova ul. 40.**

La hodiaŭa stato de Esperanto

de Karlo Minor. (Daŭriĝo.)

Kiel mi jam menciis supre, nur la F. K. enhavas proksimume 400 tiajn neologikojn, el kiuj multaj tiam enradikiĝis ke hodiaŭ eĉ la spertulo kaj eminentulo vole-nevole aplikas tiujn riproĉindaĵojn. Kompreneble oni devas fari diferencon inter la parolata kaj la skribata (t. e. presata) lingvo, kaj tio, kio sufiĉas por interparolado, jam ne sufiĉas por la literaturo; kaj same kiel en naciaj lingvoj, ni nepre devas uzi en nia literaturo kaj gazetaro multe pli korektan stilon kaj multe pli logikajn esprimojn ol estas bezonataj por la ĉiutaga vivo kaj buŝa interkomunikiĝo.

Konsiderante la multajn malkorektaĵojn kiuj enkondukis en nian literaturon pro la supre menciitaj kialoj, la spertulo ne povas dubi pri tio ke ni bezonas korektajn precipe de la Fundamenta Krestomatio, kaj ankaŭ de niaj aliaj klasikaj verkoj kaj niaj lernolibroj kaj vortaroj, aŭ per simpla anstataŭo de la malkorektaĵoj esprimoj per korektaĵoj, aŭ per komentaria aldonado de la korektaĵoj esprimoj almenaŭ al la F. K., por ke ni havu almenaŭ unu verkon nepre korektan kaj absolute modelan.

Krom la multaj gramatikaj nekorektaĵoj kiuj plie kaj plie enkondukis dank' al la F. K., la ĝisnuna formo de la § 15 de la Fundamento permesas la senfinan enkondukon de neesperantaj vortoj kiel „fabriko“, „apoteko“, „studento“, „pasaĝero“ ktp., de multegaj vortoj kun la pseŭdoafiksaj „-al“, „-or“, „-ci“ kaj de multaj, multaj aliaj vortoj kaj neologikaj esprimoj, kiuj estas internaciaj, sed kies formo tute ne estas Esperanta.

La § 15 de la Fundamento rekomendas — sed ne postulas! — ke de tiaj vortoj oni nur uzu la

radikojn kaj formu la ceterajn derivaĵojn laŭ la regulo de nia lingvo. Ĉiuj tiaj vortoj do havas la rajton por ekzisti en nia lingvo ĝis tiam kiam la § 15 de la Fundamento tekstos:

„La radikoj de ĉiuj vortoj, kiujn la plimulto de la lingvoj prenis el unu fonto, estas uzataj en la lingvo Esperanto kun ne plimulte da ŝanĝo ol estas necesa por eviti duoblajn sencojn, kaj ricevante la ortografion de la lingvo Esperanto. Vere internaciaj vortoj, t. e. interaciaj radikoj kune kun naciaj afiksaj, kies sencoj ne estas esprimebla dank' al la ekzistantaj Esperantaj afiksaj, povas esti uzataj en Esperanto kiel memstaraj Esperantaj radikoj.“

Sed ĝis nun la Fundamento estas netuŝebla, ĉar la Unua Internacia Kongreso de Esperanto tiamaniere decidis kaj estigis la Lingvan Komitaton por gardi pri tio, kaj starigis ĝian Regularon, kiu ne permesas al la Esperantanaro iri novajn vojojn por la purigo kaj Esperantigo de la lingvo Esperanto!

Certe la intencoj de tiuj kiuj proponis la fondiĝon de la Lingva Komitato estis la plej bonaj. Sed la praktiko pruvis ke la formo ne estis la ĝusta. Kvankam tiu unuocita decido ĝis nun estas respektata de la Esperantanaro, ĝijne tute reprezentas la opinion de ĉiuj. En tiama tempo la plimulto jam ne sciis kion signifas „unuocita decido“, sed hodiaŭ ĉiu komprenas kiel tia „unuocita decido“ fakte estas: la faras proponon al kongreso aŭ kuneveno; oni ĝin pridiskutas kaj poste voĉdonas. Kelkaj tute ne decidigas, multaj jam estas kontraŭ la propono, kaj la plimulto ĝin aprobas unuamomente, kvankam poste — kiam ĉiuj ĝin pripensadis kaj elprovis — ili ankaŭ ekhavas malan opinion. Sed intertempe la propono estas „unuocita“ akceptita kaj ekzistas kiel deviga decido.

Praha.

XIII-a Universala Kongreso de Esperanto kaj VII-a Kongreso de UEA

en Praha de 31-a de julio ĝis 6-a de aŭgusto 1921.

X-a Komunikilo.

Honora Komitato konstituiĝis el eminentaj ĉeĥoslovakaj politikistoj, kulturaj laborantoj, artistoj kaj reprezentantoj de la ŝtata ofico.

Delegitoj de Naciaj Esp. Asocioj aŭ organizaĵoj, kiuj salutas en solena malferma kunsido la XIII-an, estu baldaŭ komunikataj al la Loka Kongresa Komitato.

La Programon de la XIII-a kaj de la VII-a vidu sur la anonca paĝo (speciala tabelo).

Fakajn Kunvenojn organizas por *kristanoj* s-o Verner, Praha VII, Strosmajerovo 2, por *aranoj* s-o Švingr, instruisto en Bukovsko 78.

Akceptejoj troviĝas en la kongresejo sur la insulo Zofin, kie la alveturintaj kongresanoj ricevas loĝigkarton kaj ĉiujn dokumentojn kongresajn. En Zofin deĵoras vojaĝinformejoj, monŝanĝejoj, ŝtata poŝtoficeto por leteroj kaj telegramoj kaj pasportsekcio.

Pasporttrabato por Ĉeĥoslovakujo 50 % laŭ decido de la ĉs. ministerio por eksterlandaj aferoj (22. V. 1911 n-o 7155/21 fin).

Fervojtrabato 50 % laŭ decido de la ĉs. fervojministerio (25. V. 1921 n-o 28079/III) por unu vojaĝo al Praha kaj reen en ĉiuj klasoj de la persona kaj rapida vagonaro (en rapida vagonaro sole por vojaĝo pli longa ol 150 km) al tiuj kongresanoj, kiuj posedos specialan, de la Loka Kongresa Komitato eldonitan forvoj-legitimacion, kiu rajtigos uzi la rabaton en la tempo de la 25. julio ĝis 15. aŭgusto kaj estos sendota sole al tiu, kiu sendos poŝtrevene 5 ĉs. kronojn aŭ 1 francan frankon por impostmarko kaj tiurilataj elspesoj. Ĉiu samfamiliano pagas por sia fervoj-legitimacio aparte. La eksterlandanoj povas sendi la sumon ankaŭ en nealĝiutaj kaj neuzitaj poŝtmarkoj. La fervoj-legitimacio estos sendota la 1-an de julio. — La saman rabaton donas la direkcio de la Buŝehrada fervojo.

Aligiloj kaj Kongreskartoj estas senditaj al ĉiu aliginto kaj paginto. Kiu ne ricevis, sciligu

Tiel ankaŭ la formo de nia Lingva Komitato estas farita kaj estigis deviga por la tuta Esperantanaro.

Sed kun la sama rajto kun tiu unu Kongreso starigis la formon de nia Lingva Komitato, alia Kongreso povas fali ĝin kaj restarigi ĝin kun nova aspekto. Kaj se kelkaj elokventuloj tiam konvinkis la ĉeestantanon, kiu ne estis pripensinta la aferon antaŭe, ke la nun ekzistanta formo de la Lingva Komitato estas la plej trafa, certe ankaŭ estos eble kredigi per faktoj kaj pruvoj al la hodiaŭa Esperantanaro, kiu povas malhelpate pripensi ĝin, ke la formo de la Lingva Komitato (ĝiaj taskoj, devoj kaj celoj), kaj krome la § 15 de la Fundamento, tute ne estas laŭcelaj kaj nepre devas alifirmiĝi; ne por malhelpi al nia lingvo, sed por igi al ĝi profion, purigante ĝin kaj fortenante la necesajn, infektajn kaj neesperantajn elementojn. —

Mi ne postulas ke Esperanto estu „sparta“, sed la baza vortaro kaj la vortoj kaj esprimoj almenaŭ de nia skribata (t. e. presata) lingvo estu senesceptaj, absolute regulecaj kaj tiel same logikaj kiel nia gramatiko, kaj nur enhavu vere korektajn vortojn kaj vere Esperantajn esprimojn, sed ne nacilingvajn laŭ fonetika, Esperanta ortografio.

Se ni atente legas la Regularon de la Lingva Komitato, ni rimarkas ke ĝi havas tri strangajn ecojn: 1. La Lingva Komitato tute ne havas la rajton por protekti nin kontraŭ elvenantaj nepre Esperantaj verkoj kiuj infektas nian lingvon, 2. neniu certa dato nek vojo estas fiksita por la publikigo de la decidoj per maniero kiu porta la decidojn al la scio de ĉiu samideano, 3. la Regularo nur povas esti aliigata per la Lingva Komitato mem.

(Finota.)

1925 kongresanoj el 33 ŝtatoj kaj 39 nacioj aliĝis ĝis la 26. junio al la XIII-a. Kiu estos la 2000-a?

Interalie aliĝis samideanoj el Japanujo, Transvaal (Sudafriko), Alĝerio, Usono, Kanadio, Brazilio, Argentino kaj Aŭstralio.

pri tio la ĝenerala sekretario. Resendu responddan aliĝilon tuj al la ĝenerala sekretario. Al la novaj aliĝantoj estos aliĝilo kaj kongreskarto sendotaj postevene.

Kotizajon sendadu al la ĝen. sekretario en rekomendita letero! Krom la en la VII.—IX. komunikoj menciitaj pagis la sekvantaj numeroj: 21, 22, 24, 25, 27-30, 33, 37-40, 45, 46, 54-56, 67-71, 74-78, 82, 85, 86, 90-95, 95-96, 101, 107-108, 112, 116, 118, 119, 129, 130, 133, 150, 155, 186-190, 192-194, 198, 201, 234, 285, 286, 292, 242-245, 464-465, 475-480, 499, 509, 512, 517, 558, 586, 605, 605-606, 692-700, 717-719, 738-817, 820-825, 828, 829, 851-855, 840-855, 858-897, 899-902, 905-919, 921-925, 928-938, 1000-1025, 1039-1064, 1066-1090, 1092, 1094-1115, 1119-1173, 1177-1179, 1182, 1188-1189, 1197-1199, 1202-1220, 1223-1296, 1298-1302, 1307-1347, 1349-1351, 1354-1421, 1423, 1424-1452, 1454-1462, 1465-1489, 1491-1514, 1519, 1520-1565, 1566-1582, 1584-1586, 1588-1624, 1627-1635, 1635-1665, 1667, 1670-1678, 1680, 1687-1691.

Aliĝoj. Pro manko de loko ET ne plu povas repressi la liston de la aliĝintoj. La nomoj estos notataj en la kongresa libro ricevota en la akceptejo.

Kongresaj Dokumentoj kaj Eldonaĵoj. Ĉiu alveninta kongresano ricevos en la akceptejo kongresinsignon, loĝigkarton, gvidlibron pri Praha kaj kongresan libron enhavantan nomaron de la kongresanoj kaj gravajn prikongresajn informojn.

Garantia Fundo. 27. S-o Wit-Rotterdam kaj 28. Esp. Klubo en Ces. Budejovice po 100 kr., 29. s-ino Tiard-Parc-St.-M. kaj 30. s-o Tiard-Paris po 200 kr., 31. s-o Naria-Tokio 75 fl., 32. Baart de la Faille-Arnheim 100 kr., 33. s-o Warden-Edinburg 500 kr.

Donacoj. S-o Holger Hansen 10 d. kr., f-ino Meyerhuber 10 mk., s-o Batek 25 kr., Sevenhuijsen 80 c., Sergeant 10 kr., Esp. Klubo Prostějov 300 kr., f-ino Hamand 10 dol., Esp. Societo „Estonteco“ en Hor. Ruzodol 100 kr., s-o Steinhauer 10 kr. aŭsir., s-o Harna 13 kr., s-o Kreuz 40 mk., Koivu 16,50 fl., s-o Kurz 25 kr., Ivanović 10 kr., esperantistoj Nymburg 504 kr. Prof. Fuchs el Steinach donacis 100 siajn broŝurojn.

Deponita Mono. S-oj G. van Heek, Narita, Elisondo, Ahlsröm, Applebaum, Meaghy, Farnel, Jones, Sikox, f-ino Westeyn, f-ino Beukema, s-oj Warden, Edwards, Blaise, Baart de la Faille, Kennedy, H. v. Heek, Coleman, Lihndeman.

Komitato. Eksiĝis s-o Hromada.

Por la Loka Kongresa Komitato:
Augustin Pitlik,

ĉefkomisario de la ĉs. komercministerio,
ĝen. sek. de la Loka Kongr. Komitato.

La L. K. K. petas nin sciigi, ke la kongresajn aranĝaĵojn (solena malferma kunveno, laborkunveno, ĉiuj amuz-entreprenoj, ekskurso al M. Kras) povas ĉeesti kompreneble sole la kongresanoj (pagintoj de la kotizajoj). Pro la grandega nombro de la kongresanoj NE povas ricevi enirpermeson NE-aliĝintaj parencoj de la kongresanoj kaj iliaj konatuloj, kies loĝigon la L. K. K. ankaŭ ne povas prizorgi, loĝigante sole la kongresanojn.

Internacio Katolika.

Internaciaj Katolikoj Konferencoj.
Graz, 10.—14. aŭgusto 1921.

La preparaj laboroj por la internacia katolika kunveno nunjara en Graz, 10.—14. aŭgusto, havas tre bonan sukceson. El preskaŭ ĉiuj eŭropaj ŝtatoj anoncis sin partoprenantoj. La plej gravaj problemoj de la nuntempa agado internacia estos pritraktotaj. Famkonataj internacianoj katolikaj prenis sin la ĉefajn raportojn. Jen la programo:

Merkrede, 10. aŭg. pozitgeze: neoficialaj antaŭparoladoj de la interesuloj pri la internacia porpaca movado. Vespere: saluta kunveno.

Ĵaŭde, 11. aŭg.: 8—10 h. konferenco pri la internacia junulara movado. 1/2 11—12 h. Ika-konferenco: malfermo de la ĝenerala kunveno; elekto de la komisionoj; 4—7 h. porpaca konferenco.

Vendrede, 12. aŭg.: 8—10 h. junulara konferenco; ĝenerala kunveno de „Moka“, 1/2 11—1 h. porpaca konferenco, konstitucio de internacia organizo; 4—7 h. Ika-konferenco.

Sabate, 13. aŭg.: 8—10 konferenco pri la Esperantomovado katolika. Ĝenerala kunveno de Ika U. E. 1/2 11—1 h. misia konferenco. 4—7 h. Ika-konferenco.

Dimanĉe, 14. aŭg.: 8 h. solena diservo, posttagmeze fina kunveno, amuzajoj.

Lunde, 15. aŭg.: komuna ekskurso al „Bärenschütz“, unu el la plej belaj klusoj de la Kalkalpoj.

Temoj kaj Raportoj

Ika-Konferenco: 1. La nuntempa situacio internacia de la Katolikaro; 2. la internaciaj taskoj modernaj de la katolikoj; 3. la internacia organizo praktika.

Porpaca Konferenco: 1. La fundamentaj principoj kaj ĉefaj celoj de la katolika porpaca movado; 2. la internacia organizo.

Esperanta Konferenco: La graveco de internacia helpingo unueca por la internaciaj taskoj nuntempaj (kun diversaj komisionoj).

Junulara Konferenco: 1. La celoj kaj taskoj de internacia katolika junulara movado, 2. la praktika organizo internacia.

Misia Konferenco: La internacia misia tasko (enlanda kaj eksterlanda misio).

Oratoroj: Pritrakto la diversajn problemojn aŭ raportojn, i. a. jenaj paroladistoj: s-o deputato Marc Sangnier, Parizo; Prel. d-ro A. Giesswein, deputato, Budapeŝt; s-o p-ro Philippe, Bruselo; s-o prof. W. Arnold, Zug, Svisujo; s-o p-ro L. Kornilowicz, Polujo; s-o p-ro Lutkie, Nederlando, ktp.

Aliaj Konferencoj (pri la ekonomia kaj gazetara problemoj) kaj diversaj komisionoj estos aranĝataj laŭbezono.

Laŭ sciigo de la prepara komitato okazos en Praha kunveno de la katolikaj samideanoj. Komuna veturado de Praha al Graz estos aranĝata.

Samideanoj, kiuj intencas partopreni la gravegan kunvenon bonvolu anonci sin tuj.

La prepara Komitato,
Graz, Karmeliterplatz 8, Aŭstrio.

Lernejo.

Esp. Prelego por Instruistoj en Budapeŝt.

Por la instruistaro de la komuna komerca supera lernejo de l' VII-a distrikto estis speciala prelego pri Esperanto. S-ano Balkanyi prelegis la lastajn sukcesojn de Esperanto kaj klarigis ĝian pedagogian valoron. S-ano d-ro Kolocsay klarigis elokvente la mirindan sistemon de la gramatiko. La profesora kunveno kun danko akceptis la interesan prelegon kaj decidis en la sekvanta jaro efikonduki la nedevigan instruadon de Esperanto en la lernejo. Se do la situacio ne ŝanĝiĝos dumtempe, oni povas esperi tie esp. kursojn.

Kursoj en gimnazioj.

En la gimnazioj de Gyöngyös kaj Szeged (Hung.) finiĝis kursejoj.

En rusaj lernejoj.

En Uŝurum, Vjatka gub., instruado de Esperanto kiel nedeviga objekto estas enkondukita en du urbaj lernejoj kaj kiel deviga en sovjeta partia lernejo.

En Melenki, Vladimira gub., laŭ decido de loka popol-kleriga fako Esperanto estas enkondukita en lernejo, kiel nedeviga objekto.

En Maloarangelsk, Orla gub., Esperanto estas enkondukita en poŝt-telegrafa lernejo, kiel deviga objekto.

Blinduloj.

Lastan jaron dum la somera libertempo 11-jara blinda knabo de nia blindulinstituto estis en Holando, senkosite akceptita de s-oj Kaptein-Helder kaj Visser-Haarlem. La knabo, kiu estis suferanta kaŭze de la dumilila malbona kaj nesufiĉa nutraĵo, tre bone forlikigis.

En ĉi tiu jaro kvar blindaj geknaboj bone sciantaj Esperanton estas invititaj de holandaj samideanoj. Ni ilin volonte sendus Holandon, sed niaj monrimedoj ne sufiĉas por pagi la multekostan vojaĝon.

Kiu volas helpi al niaj malgranduloj blindaj, sendu monon al: M. Urban, Frankfurt a. M., Adlerflychtstr. 8, Postscheck Frankfurt 55512.

Dankindajn donacojn ni jam ricevis de s-ino H. Mundi-Aberdeen (115 mk.) kaj s-o Griffiths-Liverpool (50 mk.).

Loka Esperanto-Kartelo Frankfurt a. M.:
Schwabenthal.

Loka Grupo: Laborista Grupo: Blindula Grupo:
R. Kreuz. H. Frickard. M. Urban.

Junularo.

Asocio de Junaj Germanaj Esperantistoj.

Tiu ĉi asocio, kiu jam estas fondiĝinta antaŭ pli ol 10 jaroj kaj havis multajn membrojn en ĉiuj partoj de Germanujo, estas revivigita la 5-an de majo okaze de la Nordokcident-Germana Esp. Kongreso en Harburg per transdono de la estrarofico al pli junaj kaj pli freŝaj personoj.

Ĉiuj malnovaj membroj estas vokataj sciigi sian aprobon pri la nova estraro. Se ĝis la 1-a de aŭgusto ne alvenus malaprobaj, la sekvanta estraro ekfunkcius kiel definitiva: prez. s-o K. O. Schmidt en Flensburg, sek. s-o Karl Hansen en Flensburg, kas. s-o Kurt Franck en Hamburg.

La ĝisnuna estraro:

D-ro W. Münster, Steffin, prez.
D-ro R. Wohlstadt, Hamburg, sek.
Lage, Kiel, kas.

Sciigojn adresu al la ĝisnuna sekretario, Hamburg, Hasselbrookstr. 102, IV.

Mallongaj Esp. Sciigoj.

Postkongresa vojaĝo tra Germanbohemujo. Programo de la Saaz'a Esp. Societo.

Alveno en Saaz merkrede, 10. aŭgusto, 7.30 h. vespere. Akcepto en la stacidomo per la urba konsilantaro. Alparolo kaj saluto per s-o d-ro A. Janka, urbestro. Promenado en la urbon kaj loĝigo de la fremdaj esperantistoj. Je 9 h. vesp. komuna vespermanĝo kaj komencigo de la ĝardenkoncerto en la pafista domo. De 12 h. daŭrigo de la festivespero en la ĉambrego kaj la apudaj ejoj. Dancado en la ĉambrego kaj amuzado en la tiel nomata „infero“. Interkonatiĝo kun la Saaz'aj esperantistoj.

Ĵaŭde, 11. aŭg., je 9 h. matene kolektiĝo antaŭ la urbdomo. Oni rigardados la urbon, la lernejon por lupol-kaj legomkulturado (lupolejo, provirkulturado de lupolo), la urban lupolsignejon (konservado, premeĝado, pakado kaj signado de la eksportlupolo), la burĝan kaj la akcian bierfarejojn (fabrikado de la fama Saaz'a eksportbiero; senpaga gustumado de la biero). Ĉie klarigoj en Esperanto. Tagmanĝo. Je 5 h. posttagmeze forveturo al Teplitz.

Postkongreso en Budapeŝt.

Por la kunvido de la Postkongreso la „Kvardekoka“ Sendependeca Kossuth Partio disponigos sian belan ĉambregon kaj apudajn ejojn en la Lloyd-Palaco, kie estas ankaŭ la akceptejo kaj ekspozicio. — Partoprenantoj de la Postkongreso nepre akiru pasporton kun speciala vizo de hungara konsulo.

Adresu ĉion al la sekretario de la kongreskomitato: Aleksandro Laquer, Budapeŝt VII, Kiraly u. 57-II.

Aliĝa kotizajo la duono de la Praha.

En Budapeŝt.

La sekretario de la kongreskomitato, s-ano Laquer, kaj la amuzakomitato kun s-ano Baghy diligente laboras por sukcesigi la kongreson en Budapeŝt. La urbestro de Budapeŝt permesis monkolekton por la standardo kaj propaganda fondo de Hungara Landa Esp. Societo.

Nova Grupo en Joachimstal (Ĉeĥoslovakio).

En St. Joachimstal, fama radiumbanejo, trovejo de radiumo, s-o J. Wünsch el Karlsbad faris paroladon, post kiu fondiĝis grupo kun 45 membroj Prez. s-o urbestro F. Riedl, St. Joachimstal (Ĉeĥoslovakio).

Nova Grupo en Berlin-Wilmersdorf.

En Berlin-Wilmersdorf nova grupo estas fondita. Kurso komencis la 17. junio. Prez.: s-o d-ro Max Burkhardt, Berlin W. 15, Kaiserallee 20. Kulvenoj ĉiuvendrede je 8 h. en fam. rest. Schulz, Wilmersdorf, angulo Sächsisches kaj Wegener strato (proksime de Fehrbelliner Platz). La grupo aligos per gruparo Berlin al GEA.

Esp. Prelegoj en Essen.

Ĉiusemajnan prelegon pri Esperanto, ĝia historio, organizacio ktp. aranĝis la Esp. Grupo de 1910 vendrede je 8 h. en hotelo „Union“, teatra placo. Jam sin enskribis 57 interesatoj (sinjorinoj kaj sinjoroj), kiuj partoprenas en la prelegoj kun vigla intereso.

En Siedlce (Polio)

malfermiĝis filio de Pola Esp. Societo. Prez. estas s-o W. Hirsowski, vicprez. s-o Cz. Pruski. La societo malfermis elementan kurson por siaj membroj kaj promesas vigan laboron. Oni afable petas sendi esp. gazetojn, librojn ktp. al adreso: Siedlce, str. 3-go Maja n-o 28, por ke la societo povu fondi sian propran bibliotekon.

Departemento de Instruado en N.-S.-Kimrujo helpas.

En „La Suda Kruco“ ni legas, ke laŭ decido de la ministro de instruado de la aŭstralio provinco Nova Sud-Kimrujo (New South Wales) la departemento disponigas al la Sidney'a Esp. Soc. grandan salomon en unu vespero ĉiumonate. La ministro eĉ deziras, ke la societo havu la salomon por sia ĉiusemajnaj kunvenoj, sed por la granda nombro de aliaj uzantoj tio ne estis ebla. La societo uzos la salomon por propagando kaj praktika elmontrado de la lingvo (per teatraĵoj, koncertoj, literaturaj paroloj, ekspoziciotipo) al la diversaj pedagogiaj societoj, kies centro estas en la sama loko.

Aŭstraliaj Asocioj de Vojaĝantoj Komizoj por Esperanto.

Ĉe kongreso en Melbourne dum pasko de la aŭstralaj asocioj de vojaĝantaj komizoj (Commercial Travellers' Associations), la sekvanta rezolucio estas alprenita: „Ke laŭ la opinio de ĉi tiu asocio estas dezirinde, ke en ĉiu provinco la departemento de instruado konsideru la instruadon de Esperanto aŭ de iu alia lingvo alprenita de la Ligo de Nacioj.“

Nova Grupo en Weehawken (Usono).

La 8. marto fondiĝis en Weehawken (ŝtato New York) esp. societo sub la nomo „Hudson

County Esperanto Society". La 4. junio je la iniciato de gesamsideanoj kaj precipe de la prezidanto s-o Süßmuth oni ĝoje pastigis la unuan feston per esp. interparolo, kantado, parolado, dancoj kaj vespermango. Gastoj ĉeestis el New York kaj ĉirkaŭaĵoj. Inter la gastoj sin trovis s-oj W. Baff, James F. Morton kaj D. A. Kleĝin. S-o Süßmuth donacis al la socio verdan standardon faritan de s-ino Süßmuth kaj f-ino Anna Nettler; rekompence ankaŭ s-o S. ricevis belan donacon de siaj lernantoj.

Tra la Mondo.

La konvencio pri malokupado de Supra Silezio estas subsignita la 27. junio. Laŭ ĝi la poloj forlasos laŭetape la okupitan teritorion.

En sia respondo al la skribajo de Lloyd George prezidanto de Valera skribis interalie, ke li havas la sinceran deziron krei daŭran pacon, sed ke — antaŭ ol respondi pli detale — li devas konferenci kun certaj reprezentantoj de la politika malplimulto de Irlando. La konferenco okazos la 4. julio en la urbdomo de Dublin.

La striko de la anglaj ministoj finiĝas. La ministoj rekomencos labori venontan lundon. La fiorejo de Frankfurt aranĝis en Milano, Corso Vittorio Emanuele 22, propran oficejon. Aliaj oficejoj ĝi instalas en Helsinki ĉe firma Keller & Kroher, Fabriksgatan 4.

De vulkana insulo Stromboli (Italia) oni sciligas akran erupcion. La logiataroj forkuris.

Laŭ scilgoj la turka armeo en Malgranda Azio plifortigis per sep armekorpusoj kun 180000 viroj. La unua bolsĉevika armeo estas koncentrita ĉe la turka limo; ĝi estas komandata de Levandovski kaj plifortigita per mahometanoj kaj tataroj. Ĉefmilitestro de la turkaj trupoj kontraŭ la grekoj fariĝis Ismed Paŝa.

Supozeble la paca stato inter Ameriko kaj Germanujo ekestiĝos je la 4-a de julio.

La lasta popoldenombro en Usono havis sekvan rezulton: 94822451 blankuloj, 10465013 negroj, 242959 indianoj, 111025 japanoj kaj 9485 alilokuloj.

Havas komunikas el Quebec (Kanado), ke tie strikas la policianoj kaj fajrobrigadanoj.

Internacia Esp. Servo.

(En la intereso de la esp. propagando estas dezirinde, la artikolojn sub tiu ĉi rubriko traduki kaj represigi en naciaj ĵurnaloj, aldonante la vortojn „Internacia Esperanto-Servo“ kaj sendante 1-2 ekzemplerojn de la koncerna ĵurnalo al la redakcio de ET.)

LETERO EL ITALIO.

Bologna, 28. junio 1921.

Tre sukcesplena ne nur laŭ sporta vidpunkto sed ankaŭ pro la ne ankoraŭ taksebla rolo, kiun havas estonie la aertveturado, estis la granda provo organizita per veŝflugado de komitato por honorigo al ĉefflugisto Francisko Baracca, mortinta en junio 1918 dum la batalo ĉe rivero Piave. La konkurso okazis dimanĉon la 19-an de junio.

Ĝi pasis milon da kilometroj, ekirante de Ravenna, super Bologna, Mantova, Trento, Asiago, Vervesa, Gorizia, Trieste, Pola, Venezia, Ferrara ĝis Ravenna. Bedaŭrinde ĝis la mateno la vetero estis nubega, kaj baldaŭ je kaj je sur la vojaĝiro pluvus, ventegis kaj uraganis. Tamen la tiom pli malfaciligitan taskon niĝ spertaj aviadistoj sciis plenumi per obstina volo kaj lerteco, sed kompreneble laŭ nombro malpligrandigita.

Ekleviĝis de Ravenna de la sepa matene unu post alia deknaŭ flugmaŝinoj, el kiuj kvar faris la plenan regulan veturadon. Malgraŭ la malamikaj vetero, sur la placo de la ekflugado estis kunvenintaj miloj da homoj el ĉiuj partoj de la najbara regiono kun oro da kompetentuloj, ĵurnalistoj k. a., kiuj povis sekvi per mirige organizita servado de senfadenaj telegrafoj la iradon de la veŝflugo. Unu bedaŭrinda akcidento okazis ĉe Mestre, kie malbone alferiĝis flugmaŝino perĝinta en la nebulo, mortigante la pilotojn kaj vandante du pasaĝerojn.

La triumfantoj de la konkurso estis s-o Brak Papa, alferiĝante en Ravenna je 5.11 h. pm. per aeroplano „Fiat BR“ kun unu pasaĝero; leŭt. Gugli Amoffi (je 5 h. pm. „Sva“ unusida); leŭt. Magliocco (je 6 h. „Saml“ kun unu pasaĝero) kaj serĝ. D'Urso (je 7.30 h. „Batilla“ unusida). Dum tago tiel malfavora vere notinda estas fiaj sukcesoj kaj ankaŭ la nombro de alvenintoj (4 rilate 19).

Umberto Toschi.

LETERO EL PALESTINO.

Haifa, junio 1921.

La ĉiutaga ĵurnaloj jam sciligis la legantojn, ke la malamo inter araboj kaj judoj eksplodis terure en la urbo Jaffa, kaŭzante pli ol 50 mortigitojn kaj pli ol 250 vunditojn. La granda plimulto de la mortigitoj kaj vunditoj estas judoj. Ĉiuj kompreneble akuzas la kontraŭulojn kiel kulpajn. La araboj, ke la judoj bolsĉevikaj provokis kaj komencis la ribelon kaj perfortojn; la judoj, ke la policianoj, favoris la mortigantojn anstataŭ malhelpi ilin. La registaro klopodas por puni la vere plej punindajn.

Okaze de la vizito de granda parto de la angla mediteranea eskadro en Jaffa kaj Haifa, Sir Herbert Samuel sur bordo de la potenco „Iron Duke“ veturis Beiruton kaj konferencis kun generalo Gouraud pri la reciprokaj rilatoj inter

Sirio kaj Palestino, kiuj ĝis nun ne estis tre amikaj. Ĉar ambaŭ havas siajn malfacilaĵojn, ĉar ambaŭ devas eviti grandajn elspezojn, vera konsento donus profiton al ambaŭ.

Koncerne la novan ŝtaton de Transjordanio la klopodoj de la angla registaro daŭras, obteni almenaŭ aeran komunikon kun Mezopotamio, konstruante 3 flugstaciojn en Salt, Kerak kaj Amman, kaj konstruante nun kvaran pli antaŭe en la dezerto, en Wadi El Azrak, kie hodiaŭ laboras pli ol 1000 pintoj.

Emiro Abdallah, komence tiom ŝafita de la araboj kiel ido kaj posteulo de la granda profeto, nun jam perdis ĉian influon kaj aŭtoritaton, ĉar li estas konsiderata kiel subaĉetita de la angloj kaj judoj. Malpaco inter gentoj beduenaŭ daŭras kun mortigo eĉ de soldatoj kaj policianoj.

Okaze de la naskiĝotago de Georgo V-a, Sir Herbert Samuel farigis grandan feston en la nuna registara palaco de la Olivarba Monto. Sed la festeno ne multe plaĉis. Li mem montriĝis kvazaŭ vicreĝo kun grandaj ceremonioj, proklamante la politikon de la palestina ŝtato, kvankam preskaŭ ĉiuj konsentas, ke li sincere deziras esti egale justa por kristanoj, judoj kaj mahometanoj.

Kiel en Aŝkalono apud Gaza anglaj arkeologoj elterigis templojn, palacojn kaj ĉiusepaĵojn malnovagajn artajn objektojn, tiel judaj arkeologoj trovis en Tiberias gravajn restaĵojn de sinagogoj antikvaj, kaj katolikaj arkeologoj franciskana belegajn mozaikojn kaj aliajn artaĵojn en Kafarnaum, restaĵojn de kristana eklezio bizanita el la 4-a jarcento, proksime de la sinagogo Kafarnaum'a elterigita de arkeologoj germanaj kaj franciskanaĵ ĉirkaŭ la komenco de nia jarcento. Antaŭ nelonge ankaŭ amerikaj arkeologoj komencis elterigi en Beisan, urbo tre granda kaj grava en la estinteco.

P. E. S.

SCIIGO EL HUNGARIUJO.

Publikigo de la nova hungara ŝtatsbudgeto.

Lorant Hegedüs, la finanĉministro, transdonis al la hungara nacia kunveno (21. junio) la novan ŝtatsbudgeton de Hungarujo. De sep jaroj ĉi estas la unua denove detala budgeto. Sed nun oni devis fari budgeton nur por 52% de la teritorio kaj 41% de la popolombro de la malnova Hungarujo. Tamen ĝi estas grandega. La enspezoj estus 20 miliardoj, la elspezoj proksimume 27 miliardoj, do la deficito ĉ. 6 1/2 miliardoj da hungaraj kronoj. Ekzemple la ŝtataferovoj elspezas 4 miliardojn kaj enspezas nur 5. La tabakimposto havigas 2 miliardojn. La ŝtato prenas prunton de la hungaraj bankoj (1 miliardo) por 2,2%. De fremdlando ĝi ne prenos prunton.

Sporto.

Piedpilk.

En Budapeŝt ludis la reprezentantoj de la sudgermana ligo kontraŭ tiuj de Hungarlando. La hungaroj multe superis la germanojn kaj estris je la paŭzo per 2:0. Poste ili povis pligrandigi sian superecon je 5 goloj, dum la gastoj eĉ ne atingis la honoran golon. 30000 spektantoj ĉeestis la ludon.

Lundon, la 4-an de julio, ludis la Praha klubo „Sportbrüder 1898“, kiu estas vojaĝanta al Francujo, kontraŭ „Kölnler Ballspiel-Klub“ en Köln.

Kurado.

En la stadiono de Stokholm, la finno Nurmi starigis novan mondrekordon en kurado de 10000 metroj. Li kurlis tiun vojon en 30 min. 40,2 sek.

Aviado.

La transmara aeroplana veturado.

Ĉiunokte la servado de aeroplanoj inter Anglujo kaj la kontinento pligrandigis.

La sudaj fervojaj kompanioj sendube komencas rimarki, ke vojaĝantoj pli kaj pli ŝatas la aerovojaĝon inter Londono kaj Parizo ol la vagonaran kaj ŝipan transiĝadon.

La skribanto de ĉi tiu artikoleto loĝas tre proksime al la ekirejo Croydon kaj povas konstati, ke la diversaj aeroplan-kompanioj, kiuj starigis siajn oficejojn kaj tenejojn en la Croydon'a aerodromo, nuntempe ne ĉiam povas trovi sidlokojn por la personoj dezirantaj fari la vojaĝon. La prezo por la veturo de Croydon ĝis Parizo estas 6 funtoj sterlingaj, kaj la veturado okupas ĉirkaŭ du horojn. Inter Londono kaj Bruselo, kaj Londono kaj Holando la servado estas ankaŭ regula kaj akurata.

Demando nun estas, ĉu la fervojaj kompanioj mem entreprenos servadon de aeroplanoj por ne perdi la enspezojn, kiuj alvenas de la irado de pasaĝeroj inter Londono kaj la kontinento. Kompreneble, se ili tion faros, la jam ekzistanta organizo multe helpos la kompaniojn por konkuri; ĉar ili povos aranĝi rapidan kondukon de la pasaĝeroj al la ekirejo.

Kelkaj de la aeroplanoj havas senfadenan telefonon, kaj iliaj pilotoj povas interparoli kun la senfadenistoj en Croydon kaj dum la flugado ricevi informon pri la meteorologiaj sciigoj kaj sin orientigi, se ili ne estas certaj pri sia situacio.

Ĉe la Croydon'a aerodromo nun troviĝas iuro preskaŭ finkonstruita por alligi aeroŝipojn.

Dum junio la registaro uzis aeroŝipojn por kontroli la aŭtomobila trafikon, kiu plenis la ĉefvojojn dum la tagoj de ĉevalkonkurado apud Epsom kaj Ascot.

Gazetaro.

L'HUMANITE, 20. junio.

Artikolo „Pour aller en Russie“ priiraktas la lingvajn malfacilaĵojn de francaj komunistoj vizitintaj sian kamradon en Soviet Ruslandu kaj proponas la lernadon de Esperanto kiel etikan rimedon por forigi tiujn malfacilaĵojn.

Recenzoj.

LIBROJ.

LA STRUVELPETRO. Beletaj rakontoj kaj komikaj bildoj de d-ro Heinrich Hoffmann. Esp. traduko de J. D. Applebaum. Literatura Instituto Rütten & Loening, Frankfurt a. M., Germ. Prezo bind. 18 mk.

La „Struvelpetro“ estas libro konata preskaŭ de ĉi infano. Tial ne estas necese detale priirakti la enhavon. La moralemaj versaĵoj kaj la multaj ilustrantaj akrekoloraj bildoj pri Struvelpetro, kruela Fredriko, Manjo kaj la alumetoj, la inkaj knabetoj, Joĉjo la Dikflango-Suĉanto ktp. ja ne estas tre altvaloraj laŭ arta vidpunkto, sed ili sufiĉe impresas la infanan okulojn kaj korojn.

La eidono de tiu bonekonata verko en nia lingvo estas granda sukceso. Jen estas la fatiga rimedo, per kiu ni povas vekti kaj instigi la interesojn de niaj infanoj por Esperanto, kaj samtempe ĝi estas bonega propagandilo ĉe neesperantistoj.

La traduko estas bone komprenebla, kvankam ne ĉiam tute flua. Unu preseraron mi trovis: „spite baraktadon kaj protestojn“ (anst. protestojn).

Mi rekomendas la libron al ĉiuj esp. gepatroj kaj al ĉiuj propagandistoj.

(R-ano.)

DE OBERSCHLESISCHE FRAGE und der Wiederaufbau der europäischen Wirtschaft. (La suprasilezia problemoj kaj la restarigo de la eŭropa ekonomio.) 26-paĝa broŝuro eldonita de la komerca ĉambro de Breslau en junio 1921.

MONNA LIZA, de Mikaelo Gerasimov. Poemo. Tradukita el la rusa lingvo de N. V. Nekrasov, Ĉerson 1921. Eldonis: Esperantista Literatura Asocio (Rusa sekcio: Moskvo, la Tverskeja-Jamskaja 35). 12 pĝ. 12:17 cm. Prezo ne montrita.

GAZETOJ.

BELGA ESPERANTISTO. Majo-Junio.

Kun detala raportoj pri la Dekka Belgia Esp. Kongreso en Liège.

ESPERANTA INFORMILO. Dusemajna (!) organo de Petrograda Societo Esperantista. Abonprezo 100 rubl. por n-o. Redaktoroj Devjatinin kaj Karatajev. Adreso: Petrograd, Italianskaja 51.

Ĉu fine niaj rusaj samideanoj sukcesis trovi la necesajn rimedojn por komenci kaj prosperigi la entreprenon de bona (kaj eĉ dusemajna) gazeto? La unua n-o estas 16-paĝa (22:28 cm), plaĉe aranĝita kaj presita sur vere bona papero. Laŭ scilgo de la redakcio la menditaj esp. supersignoj ankoraŭ ne estas liveritaj, tial la 1-a n-o estas preskaŭ tute en rusa lingvo.

ESPERANTA LIGILO (en brajla lingvo). Junio.

ESPERANTISTA JUNILARO. Baugé (Maine-et-Loire), Francujo. Dua jaro (?), n-o 5, aprilo-junio 1921. Jara abonprezo 2 fr. fk., 1 ŝil.

Jen la unua n-o, kiun ni vidas de tiu gazeto; ĝi estas la ĉieltala organo de Unversala Esp. Asocio Junulara.

ESPERANTO PRAKTIKO. Junio.

Enhavas interalie detalan raporton kaj bildojn pri la Germana Esp. Kongreso en Essen.

GERMANA ESPERANTISTO. Junio.

Kun diversaj raportoj pri la 10-a nacia esp. kongreso en Essen.

HISPANA ESPERANTISTO. Majo-junio.

Ilustr. artikolo pri la VII-a Federacia Festo de Sokol en Praha 1920. — Raporto pri Dudaĵelo. — Literaturajoj.

ITALA ESPERANTISTO. Junio.

JUNA ESPERANTISTO. Majo.

Eldonata de Petrograda Unuiĝo de Junaj Esperantistoj. Hektografita dupaĝa folio, preskaŭ ne legebla.

LA LABORISTA ESPERANTISTO. Julio.

LA SUDA KRUCO. Majo.

LITERATURO. Aprilo-junio.

Kun legindaj literaturajoj kaj kun lingva fakoj.

VERDA LITOPO. Aprilo.

Enhavas tre interesajn artikolojn, bedaŭrinde la lingvo estas foje iom perfortata. Ankaŭ oni trovas multe da r. anstataŭ l, ekz. brinde anst. blinde, maldoĉe anst. maldoĉe ktp.

Parolejo.

95.

Kio estas „Firsto“?

Kara redaktoro, mi sentas ke mi devas skribi kelke da vortoj al vi, kaj petegas de vi pardonon, sciante, ke vi jam havas sufiĉe por fari, sed de tempo al tempo mi rimarkas, ke kelkaj el viaj korespondantoj uzas vortojn erare. Mi bone scias, ke vi ne povas korekti ĉiujn manuskriptojn, sed antaŭ ne longe estis artikolo de ju germana samideano, kiu uzis la vorton „akurata“ anstataŭ ĝusta, prava, aŭ sencara, kaj, imalgante ET, n-o 30 mi renkontis vorton en la artikolo tielilia „Terengitaj fulmoj kaj simplaj fulmo-forigiloj“ kiun mi tute ne komprenas aŭ povas komprenigi al mi. Mi frakasias preskaŭ la kapon, kaj ĉer mi ne estas poligloto, estas necble al mi prezenti al mi la ideon kiun la sinjoro deziras transdoni. Mi skribas pri la vorto „Firsto“. Mi demandas homojn, kiuj parolas france, germane kaj angle, ĉu ili povas sciigi al mi la signifon de tiu vorto, sed vane. Do mi petegas, ke viaj verkistoj uzaj pli internaciajn vortojn, aŭ, se ili enkondukas novan vorton, faru noton por ke ĉiuj legantoj komprenu. La verkantoj devas ĉiam memori, ke estas granda nombro da gesamsideanoj, kiuj nur scipovas sian naciun lingvon kaj Esperanton, do se ili volas prove uzi novan vorton, ili donu la signifon per frazo.

(E. E. Yelland.)

Rim. de Red. „Firsto“ troviĝas en la vortaro de Christaller; ĝi signifas: germ. First, Dachfirst; france Faîte; angle Ridge (of the roof); esperante tegmenta dorso (supro). La vortaro de Fulcher & Long nomas ĝin Ego.

96.

(Rilatas al 71.)

Pri la salutformoj, mi aprobas — kaj kutimas diri kaj skribi „Bonmateno“ k. a. En internaciaj kongresoj mi ofte aŭdis „Bonan“, „ĝis la“. Tiujn malongulojn mi forte maleprobas; s-ino Hankel samopinias kiel mi.

(Roksano, Béziers.)

97.

(Rilatas al 65.)

„Tera rando“ = bordo de la tero (titlo: lembo di terra).

(F. C.)

Tuj aliĝu al la Dektria!
Plenigu vi la duan milon
de la kongresanoj!

Anoncetoj.

(Familiaj anoncetoj senpage. Aliaj koston por dufoje enpresu la samon kiel kvin numeroj de ET. La monon ni deprezas de la konto de la abonantoj. Kvinfoja enpresu koston la duoblon.)

FEROVISTOJ. Adresoj de fervojoj estu, mi senkoste volas anonci en „Reichseisenbahnzeitung“, se mi ricevos tiujn dezirojn. Por traduki la „Internacia Konvencio pri la Transporta Trafiko“ mi ankaŭ bezonas la helpon de ĉiulandaj esperantistoj por krei fakvortaron fervojev. Ernst Muthschall, Forst i. L., Germ., Gubenerstr. 28.

ESPERANTISTOJ EN PARIZO. Hispana samideano bezonas malgrandan, ne meblitan loĝejon en Parizo aŭ ĝiaj ĉirkaŭaĵoj. Ankaŭ li serĉas laboron kiel lignaĵisto. La pasintan jaron li loĝis en Parizo kaj parolas francan lingvon. Se iu afabla kamarado povas ĝin oferti al li, skribu ĝin al jenaj adresoj: Marguerite Petit, 26 Boulevard de la Chapelle, 10 arrd., Paris, aŭ s-o Johano Compté, strato Lazareto 52, Barcelona, Hispanio.

PETO. 2 junaĵ antverpenaj instruistoj deziras migri per biciklo tra Germanio al Ĉeĥoslovakio dum sia granda libertempo (aŭgusto-septembro). Volonte ĝi loĝus unu nokton ĉe diferencaj samideanoj dum la migradvojo. Kiuj bonvolus akcepti ilin, estas afable petataj skribi al s-o Fr. Lotry, Wilrycksche vest 76, Antverpeno, Belgio.

STUDENTINO de Universitato, kiu intencas partopreni la Kongreson en Praha, deziras dum la kongreso mal-multekostan loĝejon ĉe esp. familio aŭ ĉe kolegio. Ofertojn peras la redakcio de ET.

TRAVETURONTAJ fremdlandaj samideanoj estas ĉe mi gasteme akceptitaj kaj povos ĉi mi senpage tranokti. B. Wachowski, Essen-Dellwig, Kraienbruchstr. 65a (Germanio).

INTERSANĜO. Kiu havigos al mi ekzempleron de „La Interrompita Kantio“ de Kabe, al mi mi sendos ekzempleron de mia ĵus aperinta libro: „Germanaj Kantoj Esperantigitaj“. Friedrich Pillath, Essen (Germ.), Ortrud-Str. 48.

NOVA ADRESO. Ni komunikas, ke ni transloĝiĝis al Bydgoszcz. Nia nuna adreso estas: Fratoj Fethke, Bydgoszcz, Polio; ul. Petersona 11.

EDZIĜO. Laboristo, ĉ. 55-jara, deziras konatiĝi kun samaĝa esperantistino de kiu ajn nacieco por eventuala edziĝo. Alskriboj kun fotografiaj estu adresataj al s-o D. Holm, Källgatan 4, Eskilstuna, Svedio.

EDZIĜOPETO. Tridekjaraulo deziras edziĝi al fraŭlino aŭ vidvino, kiu laboras por la esp. lingvo; ŝi devas esti preskaŭ samaĝa. Sendu portreton, poste mi sendos la mian. Mi estas laboristo. S-o Mariano Donito, str. Prado 110, Habana, Kuba.

SENPIEDULO, invalido, ire volus korespondi kun iu kuracisto-kirurgisto (samideano) pri amputacio de piedo kaj pri mekanika piedo, tial nomataj „protezoj“ aŭ deziras sciigi pri adreso de konata germana kirurgisto. Nikolao Saharov, poŝto Soroga de Tvera gubernio, vilaĝo Ulnici, Ruslando.

RAKONTOJ. Al Mexin, Montreux, Svisujo, 65, Grand Rue, petas sendi al ŝi esperantigitajn rakontojn el ĉiulandaj infanj legolibroj. Respondoj per bela vidaĝo el Svisujo aŭ alia svisa aĝo, laŭ deziro esprimota.

Korespondo kaj Intersanĝo.

(Dufoje enpresu koston la samon kiel tri numeroj de ET. La monon ni deprezas de la konto de la abonantoj. Kvinfoja enpresu koston la duoblon.)

Ĉeĥoslovakio, Praha VIII - 1079, s-o J. Mikš, oficisto, deziras intersanĝi poŝtmarkojn.

M-of. B. Giedra, Litovio, Veik. armija 1-os p. Divizijos ŝtabas, deziras korespondadi per artaj poŝtkartoj kaj leteroj pri la studenta vivo en ĉiuj landoj. Laŭ volo intersanĝas ilustritajn poŝtkartojn je litovaj poŝtmarkoj. Akurate respondos.

V. Misiunas, Kaŝedorys (Litovujo), Vilnius kontr Zvalgu Dalis, intersanĝas ilustr. poŝtkartojn kaj leterojn nur kun fraŭlinoj.

Kiu sendos al mi 50-50 nesamajn poŝtmarkojn de sia lando, ricevos same tiom da germanaj poŝtmarkoj. Hermann Wollert, instruisto, Menzelend-West, Rejnlando, Germ.

Fritz Thiel, Swinemünde (Germ.), Seestr. 2, deziras korespondi kun ĉiuj landoj per poŝtkartoj ilustr. kaj intersanĝi poŝtmarkojn.

S-o Werner Meschke, Plauen i. V., Germ., Gartenstrasse 47, deziras korespondi kun eksterlanduloj per poŝtkartoj ilustritaj kaj intersanĝi poŝtmarkojn kaj gazetojn esp. Tuj kaj nepre respondos al ĉiuj.

S-o Franz Strätz, Halle a. S., Germ., Lessingsstrasse 28, II., deziras korespondi kun eksterlanduloj per poŝtkartoj ilustritaj kaj intersanĝi poŝtmarkojn kaj esp. gazetojn. Tuj kaj nepre respondos al ĉiuj.

Anton Theilke, Düsseldorf (Germ.), Johannstr. 18, deziras korespondi per poŝtkartoj kaj intersanĝi poŝtmarkojn.

S-o Peter Donner, Düsseldorf (Germ.), Fährberstr. 118, deziras korespondi kun s-anoj ĉiulandaj.

S-o Max van der Gracht, Düsseldorf (Germ.), Friedrichstr. 16-15, deziras korespondi per ilustr. poŝtkartoj kaj intersanĝi poŝtmarkojn; ĉiam respondos.

S-o Paul Becher, poŝtoficisto, Köln, Germ., Burgunderstr. 7, deziras korespondadi per leteroj kaj poŝtkartoj kun gesamideanoj en ĉiu lando.

S-o E. Friebe, instruisto, del. de UEA, Dresden-Dobritz, Residenzstr. 24, I., serĉas gekorespondemulojn en la tuta mondo. (Leteroj pri ĉiu temo, il. poŝtkartoj de vidindaĵoj, de la popola vivo.) Donas informojn pri komerco kaj industrio en sia regiono. Preferas neinterrompitan korespondadon.

S-o Lois Bauer, oficisto, Glashütte, Ichendorf, Bez. Köln, Germ., deziras korespondi per leteroj kaj poŝtkartoj kun ĉiuj landoj, precipe kun fraŭlinoj.

Mi deziras intersanĝi ilustr. poŝtkartojn kaj poŝtmarkojn kun la tuta mondo. Ernst Rinkowski, Berlin-Neukölln, Weserstr. 177, Germ.

Fraŭlo Jozefo Benagez, Esp. Grupo, Centro de Dependentes, str. Prado 61, Habana, Kuba insulo, deziras korespondi kun gesamideanoj de ĉiuj landoj per ilustr. poŝtkartoj kaj leteroj pri ĉiu afero. Mi ĉiam kaj tuj respondos.

S-o Konrado Doménech (elp. Domenek), instruisto, Rambla Alvarez 12, Girona (Hispanujo), deziras korespondi kun ĉiulandanoj, precipe fraŭlinoj, per leteroj kaj ilustr. poŝtkartoj.

S-o Josef Wawrzynski, Bydgoszcz, Polio, ul. Ryterska 5, deziras korespondi kun fraŭlinoj kaj sinjoroj per ilustr. poŝtkartoj kaj leteroj kun ĉiuj landoj.

Kiu deziras aĉeti malkare poŝtmarkojn de „Fiume“, Jugoslavio, Litovio kaj Polio, aŭ intersanĝi poŝtmarkojn kaj papernonon, bonvolu skribi al s-ro L. Galinski, Sobieskiego 3, Białystok, Polio.

Lwow (Polio), str. Sw. Zofii 44, s-o Fr. Zachariasiewicz, liveras 100 malsamajn poŝtmarkojn polajn por sendo de 5 sv. fk., 200 poŝt. pol. por sendo de 25 sv. fk.; aŭstrajn kaj germanajn kun subskribo Poczta Polska, plebiscit, ruĝa kruco ktp., ankaŭ intersanĝas poŝtmarkojn laŭ katalogo de Michel 1920.

Aleksandr Samojlov, Sbornaja 9a, Simbirsk, Rusujo, deziras korespondi kaj intersanĝi per poŝtmarkoj, poŝtkartoj, pl. ilustr. kaj leteroj kun la tuta mondo.

La Programo de Praha.

XIII-a Universala Kongreso de Esperanto kaj VII-a Kongreso de UEA.

Dato	Antaŭtagmeze	Posttagmeze	Vespere
Sabato 30. Julio			Interkonatiga vespero en la kongresejo sur insulo Zofin.
Dimanĉo 31. Julio	Kunveno de KKK. — Kunveno de la Lingva Komitato en la Reprezentanta Domo.	Solena malferma kunveno de la XIII-a en la Reprezentanta Domo.	Internacia koncerto en Zofin.
Lundo 1. Aŭgusto	I-a kunveno de UEA.	I-a laborkunveno de la XIII-a.	Akademio de ĉeĥoslovaka kant- kaj muzikarto en Reprezentanta Domo
Mardo 2. Aŭgusto	Fakaj kunvenoj en lernejoj.	Vizito de la malnova urbdomo kaj de la kastelo (eventuale daŭrigo de la fakaj kunvenoj).	Internacia kostumbalo en Zofin.
Merkredo 3. Aŭgusto	II-a laborkunveno de la XIII-a.	II-a kunveno de UEA.	Teatra prezentado „Nokto en Karlštejn“ en la teatro de Vinohrady.
Ĵaŭdo 4. Aŭgusto	Ekskurso al Moravia Kras (eventuale al Karluv Tyn)		
Vendredo 5. Aŭgusto	III-a kunveno de UEA.	III-a laborkunveno de la XIII-a.	Internacia koncerto de blindaj kantistoj kaj virtuloj en Zofin.
Sabato 6. Aŭgusto	Ferma kunveno de la XIII-a.	Kino-prezentado de la XIII-a.	
Dimanĉo 7. Aŭgusto	Postkongresaj ekskursoj al: Fr. Lazne [Franzensbad], Kutna Hora, nordbohemiaj urboj (aranĝos Ligo de Germanaj Esperantistoj en Ĉeĥoslovakio), nordbohemiaj banlokoj (kuracista ekskurso), Tatry kaj Bratislava.		

Ĉiuj laborkunsendoj de la XIII-a kaj de UEA okazos en la kongresejo Zofin.



LEIPZIG-A
SPECIMENFOIRO
FOIRO
POR TEKNIKO KAJ KONSTRUKTO
 Aŭtuna Foiro 1921 de la 28-a de aŭgusto ĝis 3-a de septembro
 Printempa Foiro 1922 de la 5-a ĝis 11-a de marto
La centra merkato por la internacia komerco kaj ofertado
 Same grava por eksportantoj kaj por aĉetantoj
 Informojn donas kaj aliĝojn akceptas
MESSAMT FÜR DIE MUSTERMESSEN
IN LEIPZIG
 (Fotografio por la Specimenfoirojn en Leipzig)

Franco

kun bonaj referencoj komercaj deziras reprezenti en Paris eksterlandajn firmojn pri ĉiuj komercaĵoj

kaj produktoj. Donas komercajn informojn pri francaj komercaĵoj. Perfektaj diskreteco kaj honesteco.

Adresu ĉion al

S-o Emile Béchet

28, rue Leroyer, Vincennes (Paris).

Razaparatoj por poŝto, el latuno argentumita, en bela nikelumita ujo, tegita per veluro.

Bruligiloj. Lasta novaĵo: Bruligilo „Patent-kraĵono“ n-ro 116, uzbla kiel bruligilo same kiel kraĵono. Objekto por ĉiutaga uzado. — Seriozaj aĉetantoj menu nian prezaron. Ni serĉas reprezentantojn.

Muscat & Christlein, Nürnberg, Germ.

La lastaj tagoj de D-ro Zamenhof kaj la funebra ceremonio.

Valora memorajo por ĉiu esperantisto. Presita sur arta papero.

Kun 12 ilustraĵoj laŭ originalaj fotografiaĵoj. (Funebra procesio sur strato Teatralna. — Sur la Tombejo. — Enterigo de la ĉerko. — Paroladoj de la predikanto d-ro Poznanski, de s-ano Grabowski kaj de majoro Neubarth. — La tombo, novaj fotoj de aprilo 1921.)

Prezo de la verketo 2 sv. fk., 15 germ. mk. Eldonejo de „Esperanto Triumfonta“, Köln-Horrem.

O. Sklenčka, Delegito de UEA, Hradec Králové

Ĉeĥoslovakio

peras kaj prizorgas ĉiusepacajn aferojn kaj rilatojn komercajn, informajn, intersanĝajn ktp.

inter fremdlando kaj Ĉeĥoslovakio.

Bonvolu uzi miajn fidindajn servojn!

ARGENTINIO.

Reprezentador de ĉiusepacaj komercaĵoj, facile vendeblaj en Sudameriko, nur de kapablaj firmoj unuaklasaj, akceptas eksoficisto teknika de la Argentinia Terkultura Ministerio. Konatiĝis bonege dum 7 jaroj kun la tiaj ekonomiaj cirkonstancoj. Post kelkmonata restado ĉi tie reveturos Argentinon, trapasante okcident- kaj nordokcident-eŭropajn landojn. Absolutaj moralaj-materiaj garantioj. Adreso ĝis la XIII-a: L. Kelety, Szászsebes (Sebesul Sasesc), Transsilvanio, Rumanio; poste: Kelety-Martelli, c. Caseros 528, Buenos-Aires, Argentino.